La Komisiono ne sufiĉe atentis la faktan uzadon en Esperanto mem. La Aŭstria Esperanto-Instituto, cetere konata kiel konservativa, post esploro de la longa uzado de »Aŭstrio«, prave agnoskis la paron **Aŭstrio / Aŭstriano**, plene konforma cetere al la internacieco; la Komisiono kotnraŭe preferis, kaj Dio scias kial, du purajn esperantismojn: Aŭstrujo / Aŭstro. Alian fojon ĝi senintence trafas la relative pli grandan internaciecon per **Etiopio / Etiopiano**, malgraŭ tio, ke ili ne estas plej uzataj. Sed ial la tre uzata kaj ankaŭ treege internacia **Finnlando** estas eliminita profite al Finnujo. Stranga decido, kiun feliĉe neniu obeos. Ĉu temas pri fobio al duobla konsonanto? Se jes, sufiĉis elekti **Fino** kaj **Finlando**!

Kaj jen, por fini, divenaĵo: kiuj estas la tri partoj de Ĉeĥoslovakio? La radikoj estas Bohem-, Morav-, Slovak-; vi rajtas aldoni unu **-io**, kaj du **-ujo**; mi helpu vin dirante, ke antaŭ la unua Mondmilito kaj tuj poste oni multe uzis la vorton Bohemujo. Respondon trovu ĉe numero 125, dorse de la Mondmapo! Same en Ĉinujo: ni tie trovas Manĉurio kaj Sud-Mongolujo!...

Vere, voĉdonado ne povas anstataŭi sciencan esploradon.

*
* *

Restas tamen, ke temas pri monumenta laboro kaj tre utila. Ni severe kritikis, ĉar la verko kaj la temo tion meritis. Aliparte ĉiam eblos kontesti niajn kritikojn: sed finfine mi citis malpli ol 50 nomojn el listo de 850. Tio ne estas tiel multe, se ni konsideras, ke temas pri unua eldono kaj ke la aŭtoroj alvokis al kritikoj por plibonigo post 3—4 jaroj: nur sur laboro de antaŭuloj eblas konstrui ion pli bonan.

Ili meritas helpon: abunde aĉetu la mondmapon. Bela kaj ĝisdata, vi ornamu per ĝi vian bibliotekon aŭ hejmon; dank'al ĝi vi observu la mondajn eventojn esperante!



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 19. n-ro 3/4 (1968)

**613.62:611.78 + 612.79**

## NOVA UNGOMALSANO KAŬZITA DE VIBROJ

**(Aleksandro Kulcsár, Pécs, Hungarujo)***

La patogena rolo de la serie ripetiĝantaj mikrotraŭmoj estas ĝenerale konata. Ili povas estigi ankaŭ okupiĝan damaĝon, unuavice vibran en plimultaj okupiĝoj. La malsanoj kaŭzitaj de vibra damaĝo estas unuavice degenerativaj procezoj, en kiuj la patogena faktoro estas iu angioneŭroza perturbo kaŭzita de tiuj konstantaj vibroj.

Nature, vibraj malsanoj ne estiĝas sammaniere ĉe ĉiuj laboristoj. Tio ĉi aludas al tiu fakto, ke krom la kaŭzanta faktoro, la vibro, aliaj (ĉefe internaj) faktoroj ludas tie ankaŭ rolon. Ĉi tiu interna faktoro estas antaŭ ĉio la kongenita displaza strukturo de la arteriosistemo, la tiel nomata angioneŭroza konstitucio.

En kazo de konvena, interna, individuala dispozicio la difektiĝoj estas komence funkciaj, en la kapilaroj aperas komence spasmo, poste la longdaŭra spasmo kaj konsekva iskemio formigas ankaŭ organajn difektiĝojn. Klinike tiuj organaj difektiĝoj estas karakterizataj per degenerativaj difektiĝoj, kiuj devenas el atrofika perturbo.

El vidpunkto de vibra damaĝo estas tre signifa la laboro de, per pneŭmatika martelo laborantaj, ministoj. Inter la ministoj la vibra damaĝo montriĝas kiel artikaj difektiĝoj, pli guste patogena faktoro estas la vibra damaĝo en artikaj malsanoj de ministoj.

Nun en tiu laboro ni ŝatus konatigi difektiĝon kaŭzitan de vibroj kiu aperis unuavice sur ungoj, klinike en formo de tre karakteriza sindromo.

---

*) D-ro A Kulcsár, Komitata Prizorga Instituto, PECS, Hungarujo.

27-jarula, mezkonstitucia, hakministo anoncis sin en nia prizorga instituto unue en aprilo de 1961. Liaj plendoj estis sekvaj: Ekde kelkaj monatoj, ĉefe dum nokto kaj post ripozo unuafoje en liaj manoj, antaŭbrakoj, kaj malpli en la piedoj, li sentis tiradajn dolorojn kaj torporon. Samptempe la ungoj de manoj koloriĝis kaj rompiĝis. La doloraj estis plej fortaj en la distala parto de fingroj.

En la anamnezo li havis nenion krom 30% da silikozo. Li fumas modere (15 cigaredojn potage), kaj trinkas iom multe ol la mezvaloro.

**Haŭtstato:** Oni povas observi signojn de resaniĝinta aknemorbo sur lia vizaĝo kaj dorso. Inter piedfingroj estas mikoza deskvamo. Sur ungoj de manoj kaj ankaŭ iomete sur ungoj de piedoj sekvaj simptomoj estas observeblaj: La ungoplatoj ĝenerale iomete dikiĝis. Sur ĉiu ungo estas longitudaj, paralelaj, flavetblankaj strioj de la lunolo ĝis la libera rando de l'organo. Sur kelkaj ungoj la najbaraj strioj kunfluis, sed nur parte. Kelkaj ungoj komencas nigriĝi apud la libera rando kaj la liberaj randoj de tiuj ungoj enfendiĝis, disfibriĝis.



**Bildo 1**

Komencantaj— pli malfruaj difektiĝoj.


Dum pli malfrua tempo la distalaj partoj de l'ungoj tute nigriĝis, kaj post tiu la tuta ungoplato perdis malrapide sian formon, ĝibajiĝis, leviĝis el sia bazo kaj post kelkaj semajnoj tute malfiksiĝis. La tuta procezo okazis dum ĉirkau du monatoj po ungo. Ĉe la rekreskantaj ungoj postnelonga tempo similaj simptomoj aperis. Sur la ungoj oni ne povis observi elformiĝon de »tamburfrapilfingro«. La oscilometraj valoroj estis normalaj, sed en malvarmo la doloroj fortiĝis enla fingroj, la manoj iomete blankiĝis, sed eksplicita sinkopo ne montriĝis.

Interne neniaj patologiaj difektiĝoj estis troveblaj. Neŭrologia esploro: parezo kaj distona perturbo ne estas. Reflekso de maldekstra bicepso estas malcerta. Suspekto de disocia sentperturbo estas.

Laboratoriaj rezultoj: Normala sangbildo, modera hiperacideco. Krom silikozo negativa RTG bildo de la torako. EKG estas same negativa. La ostradiografia bildo: Spino bifida ĉe la vertebro S/1. Sur la kolvertebroj signo de spondilizo ne estas. Cetere tute negativa.

El funkciaj difektiĝoj pli rapida ruĝiĝo montriĝas post intraarteria injektado de acetilcholino. Cold-pressor test: maksimuma plialtiĝo 15 Hgmm. Eksperimento laŭ Csépai: Post adrenalino 20 Hgmm leviĝo de sistolpremo aperis, post sevenalo 15 Hgmm malleviĝo de sistolpremo.





**Bildo 2**

Disvolviĝo de la procezo ekde koloriĝo ĝis malfiksiĝo de ungoj

Ni povis observi la malsanon kontinue ekde aprilo 1961. Dum tiu tempo nenia esenca pliboniĝo montriĝis en ĝia stato. La perioda procezo de ungoj ripetiĝas konstante kaj la subjektivaj plendoj, la doloro kaj torporo fortiĝas, se li faras sian laboron konstante. Pro tio li, kiel hakministo, ne povas labori per pneŭmatika martelo. Dum la lastaj 4 jaroj li pasigis 550 tagojn en ne laborkapabla stato. Post kelksemajna ripozo kaj dozado de angiolarĝigantaj medikamentoj liaj subjektivaj plendoj malfortiĝas, la destrukta procezo de ungoj malpliiĝas.

Ni volis klarigi ankaŭ la rolon de mikoza faktoro, pro kio pli ofta breda esploro okazis el la ungoj por mikozo. Rezultoj estis kelkfoje pozitivaj, alifoje negativaj. Pro tio ni donis unuafoje Griseofulvon. La ricevita rezulto estis nur ke la ungoj iĝis negativaj, sed la plua destruktiva procezo kaj la subjektivaj plendoj restis neŝanĝitaj. La pozitivan mikozan rezulton ni konsideris esti nur sekundara, akcesora fenomeno, kaj ne la patodeveniga faktoro.

Dum somero 1964. aperis la unuaj ostdeformiĝoj en RTg bildoj: multaj malgrandaj vakuoloj en la ostoulna kaj osto kanota de ambaŭ manoj. En la proksima parto de la dekstra ulno estas malgranda maldensiĝo.

La kapilarmikroskopaj bildoj montras angioneŭrotikajn, distrofajn sangangiojn ekde la komenco.

Kun la observita ungodeformiĝo de nia malsanulo ni ne renkontiĝis ĝis nun en la fakliteraturo. La klinika bildo similas pleje al »Pigmentatio longitudinalis striata«, priskribita de LANGHOFF, SCHWENKE, BINGHAMM, TELLER kaj kunlaborantoj, sed diversas parte de tiu, ĉar en nia kazo estis nur longitudinala pigmentiĝo, sed dum la procezo la liberaj randoj de farbiĝintaj ungoj disfibriĝis, gibiĝis pro subunga hiperkeratozo, ili baldaŭ malfiksiĝis de la bazo. En la priskribita malsanbildo de la supremenciitaj aŭtoroj la bazo kaj formo de ungoplato ne ŝanĝiĝis.

SCHMIEDT observis ungodifektiĝon similan al la nia okaze de periferia cirkulada perturbo, sed ĝi difersas per tio, ke en kazo de tiu aŭtoro la finfalangoj de fingroj plidikiĝis kaj fariĝis cianozaj pro la perturbo de periferia sangcirkulado, kontraŭe en nia kazo tio ĉi ne okazis. Ambaŭ kazoj similas unu al la alia en tio, ke oni povas observi en la kapilaroj grandmezuran spasmon.

LINSER priskribis ungodistrofion okaze de »Keratodermia palmoplantare hereditarium«. Ĉe nia malsanulo eĉ suspekto de ĉi tia simptomo ne prezentiĝis.

STÜHMER priskribis ankaŭ ritman ungodistrofion nomitan »Dystrophia unguium schindalanoides«, tiun li observis okaze de ĝenerala shlerodermo, psoriaso kaj maljuneca universala distrofio. Ĉe nia malsanulo eĉ spuroj de ĉi tiuj morboj ne estis.

Esplorante la kaŭzojn de tiu morbo ni povis observi nek familian faktoron, nek iun internan faktoron surbaze de ripetitoj, tre detalaj internaj esploroj, kiu povus ludi iun rolon en la estiĝo de la priskribita ungomorbo. La faktoro, kiu povas roli en la patogenio de la difektiĝo estas la vibra damaĝo kaŭzita per pneŭmatika martelo. Al tiu krom la tuta negativa anamnezo ankau la fakto, ke se la malsanulo ne laboras tielmaniere, tiam lia stato pliboniĝas, aliflanke post kelksemajna ĉi tia laboro lia stato ĉian malpliboniĝas.

Do, la priskribitan malsanbildon, kiun ni prinomis »Onychodystrophia mutilans« ni konsideras esti degenerativa, profesia malsano kaŭzita de vibra damaĝo.

**L i t e r a t u r o:**


ACHTEN G. Dermatologica 126:229 (1963)
BINGHAMM Brit. Journ. of Derm. 65:418 (1953)
DUPPERAT et KOFF. Zbl. für Haut — u. Geschl. 87:65 (1954)
KLINGMÜLLER G. et REEH E. Arch. für klin. u. exper. Derm. 6:574 (1955)
KOESCH F. Handbuch der Berufskrankheiten G. Fischer Verlag (1962)
KULCSAR S; Berufsdermatosen 14:244 (1966)
LANGHOFF et SCHWENKE Derm. Wochenschr. 133:297 (1956)
LINSER Derm. Wochenschr. 129:594 (1954)
MAGOS L. et OKOS G. Orvosi Hetilap 95:1204 (1954)
OSTOWARI H. Derm. Wochenschr. 139:207 (1959)
PFISTER R. et WEIRICH E. G. Hautarzt 7:3 (1956)
SCHMIEDT Derm. Wochenschr. 137:529 (1958)
SOMOGYI et RACZ Bőrgyógy. és Ven. Szemle 37:246 (1961)
STÜHMER A. Dermatologica 115:428 (1957)
TELLER, PLENGE et KLINGLBEIL. J. med. Kosmet. 213 (1953)
VÁMOS Bőrgygy. és Ven. Szemle 24:109 (1958)
VÁMOS et HORVÁTH Bőrgyógy. és Ven. Szemle 37:102 (1961).





SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 19. n-ro 3/4 (1968)


401:161.1

## NOCIO KAJ VORTSIGNIFO

**(Kontribuo al la esplorbazo de ĉiuj sciencoj)**


**(E. Werner, Wien, Aŭstrio)*)**


### A. Enkonduko

1. Kiel B. L. Whort en sia libro »Language, Thought, Reality« (Lingvo, Penso, Realeco) montris per la ekzemplo de lingvoj indianaj, la homa pensado, precipe la formado de nocioj, multe pli dependas de la lingvo ol oni kutimis pensi antaŭe. Rekomendiĝas do ekesplori la »nocion de la nocio«[1]) de la lingva flanko.

2. La vorto 'nocio' estas en Esperanto relative juna; en la komenco oni diris 'komprenaĵo' (ideo, kiel oni komprenas iun aferon aŭ ajon). La vorto 'komprenaĵo' estas »memkomprenebla« [2]), ĉar el la radiko kaj la sufikso oni povas tuj kompreni, kion ĝi signifas, kion ĝi volas diri. Per la vorto 'nocio' oni ne havas tian avantaĝon, oni devas konsulti la vortaron kaj eventuale studi la vortojn en la romanaj lingvoj (notion, concept ktp.) kun ilia etimologio de »noti«, »kapti«. Do 'nocio' signifas proksimume »notaĵo« aŭ (spirita) »kaptaĵo«, kiuj ideoj certe malpli trafe klarigas al ni la signifon ol la esprimo »komprenaĵo«.

3. Sed egale, ĉu ni derivas la vorton 'nocio' de 'noti" 'kapti, aŭ de 'kompreni', la baza verbo estas transitiva kaj signifas »ekscii ion«. Sekve la substantivo 'komprenaĵo' (la 'nocio') estas aplikebla (laŭ la


*) Pilgramgasse 9/27, 1050 Wien, Aŭstrio.